



Informoj:  
Arto -- Literaturo  
Turismo -- Sciigoj

# NIA VIVO

Administracio  
kaj Redakcio:  
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

## KION NI FARU?

Jen, Fratecano, nia Bulteno. Jen, leganto, modesta rezultato de esperplena nia laboro. Jen, esperantisto, nova lumeto, tre pala ankoraŭ, kies radiojn povos kreskigi via akcepto kaj laŭpova helpo.

Tiu ĉi presajo estas eĥo de idealo nia. Ni volis labori por amata Esperantismo, kaj tiu deziro okazigis la publikigon de la jena presfolio.

Bulteno, revuo, presajo: ne gravas. Ni dezirus nomi ĝin revuo, sed ni ne kuraĝas ankoraŭ. Eble, post iom da tempo, se la legantoj nin helpas...

Frateco komencis eldonon de sia Bulteno. Kelkaj membroj de nia Societo organizis la aferon, kaj ĉiu fratecano estas devigata kunlabori. Sekve, necese estas ke ni konfesu nian malfortecon, ke ni alvoku ĉiujn amantojn de Esperanto al komuna interesiĝo je nia laborado.

Celoj? Komence de la vivo de NIA VIVO, ni mem demandas al ni pri tio: Kion ni faru? Malfacila ja estas respondo; ĉar ni pripensis diversajn vojojn por atingi nian celon; sed la sole vera vojo, tiu kiun ni sekvas, devas esti signita de la legantoj mem, kies opinion ni klopodos atenti, kies sugestojn ni ĉiam dankeme akceptos. Ĝis nun, ni nur povas desegni la komencon de nia vojo, sed ni ankoraŭ ne scias ĉu la direkto devos esti ŝanĝita, por ke nia Bulteno ne estu reflektajo nur de niaj emoj, sed ankaŭ de tiuj de niaj legantoj.

Tamem, nia provizora intenco estas jena:

Ni volas ke nia Bulteno estu utila kiel praktikilo por komencantoj; nia ĉefa deziro estas ke ĉiu esperantisto kunlaboru; ke ĉiu leganto de nia lingvo, forlasante timemon, sin provu en la Esperanta verkado; mallongaj artikoloj pri diversaj temoj, verkitaj de komencantoj, aperos konstante en niaj paĝoj kiel paŝo al timemuloj, kaj ju pli da nomoj aperos subskribante verkaĵojn, despli plene estos atingita nia celo.

Nur ni volas prepari kreon de Esperanta Literaturo ĉe niaj samideanoj. Havigi al ĉiuj okazon por praktiki la lingvon kaj helpi tiel al verkemaj mensoj kies fruktoj hodiaŭ estas nekonataj kaj nekoneblaj.

NIA VIVO estos ankaŭ informata Bulteno; laŭ sia

eblo, ĝi klopodos esti utila al sciemulo; ĝi neniam batalos, se batalo ne estas necesa. Nur unu estas ĝia celo: Labori por Esperanto, kaj Esperanto malamas batalojn.

Nia Bulteno estas nur provajo por pli altaj aferoj; eble, se ĝi estos bonvole akceptata de la legantaro, baldaŭ aperos sub revua titolo, kun multaj ilustritaj paĝoj. Kaj ĉi tie finiĝas nia kapablo; nia intenco devas esti faktigita de niaj samcelanoj, ĉar nur de ili dependas ke ni kuraĝe plifortigos la Bultenon, aŭ ke ni daŭrigos nur publikadon de informfolio.

Por atingi nian celon ni havas nenion krom nian entuziasmon. Nu, Fratecano, Esperantisto, via helpo estas necesa.

Dankeme, nia emo estas plezurigi vin, kara leganto.

R. GASTÓN.

## ARAGONO KAJ LA DEZERTAJ REGIONOJ

Eble tiu ĉi titolo ŝajnos al vi, leganto, iom stranga. Tamen, nuntempe oni ofte aŭdas paroli aŭ oni legas pri tiu temo, kiu ĉiam, sed nun pli multe ol iam, estas ja interesa.

Unue ni vidu kio estas dezerto, komprenante per ĉi tiu vorto nur la tipajn landojn kie sekeco estas tro granda kaj manko da loĝantoj preskaŭ absoluta, kiel okazas ekzemple en Saharo, Atakamo, Kalaharo kaj Gobio inter aliaj.

En ĉi tiuj dezertoj sekeco ja estas la ĉefa kaŭzo por neloĝebleco de la lando, ĉar ĝi tute malebligas trinki kaj kulturi profite la teron kaj sekve, rikolti la necesajn nutraĵojn por la homa vivado; ankaŭ tiu sekeco mem okazigas, ke herbo kaj spontanaj vegetaĵoj ne ekzistu tie, do, ankaŭ ne bestoj sin nutrantaj per ili, nek rabbestoj kiuj manĝas ĉi tiujn lastajn. Se en tiaj landoj ne estas alia, ekspluatebla, natura riĉeco; ekzemple: minoj, guanoj k. c., kiel okazas en Atakamo ĉe la norda Ĉilio, ili nepre estas ne loĝataj kaj pro tio veraj dezertoj.

Kial en tiuj malloĝaj landoj sekeco estas tiel granda? Tio obeas precipe al tri jenaj kaŭzoj. 1.<sup>a</sup>: Ĉiuj ĉi dezertoj estas lokitaj en iu el ambaŭ tropikaj zonoj, kie pluvado estas plej malabunda



el la tuta terglobo kaj varmo, sufiĉe troa.—  
2.<sup>a</sup>: Preskaŭ ĉiam, ili estas ĉirkaŭataj de montaroj, kiuj altiras sur sin, ĉu pluve ĉu neĝe, la malmultan malsekecon kiun enportas la nuboj flugantaj trans ilin, mezen de tiuj vastegaj kavajoj kaj.—3.<sup>a</sup>: Ofte, tiaj landoj havas kontinentan klimaton; t. e.: klimato kun grandaj temperaturaj diferencoj inter somero kaj vintro; do, malplaĉa por homoj kaj ne taŭga por vegeta vivado, krom tio ke sekeco fariĝas tiel, pli troa ankoraŭ some-re. Tio estas kio okazas en Sahara, Gobia, Araba kaj Nubia dezertoj, lokitaj meze de la grandaj termasoj de Afriko kaj Azio.

Ni ekzamenu nun, ĉu Aragono, aŭ pli ĝuste dirate, la Ebra regiono havas tiajn netaŭgajn vivkondiĉojn. Kaj oni unuavide rimarkas ke ne, ke ĉi tie, la loĝantara denseco, kvankam ne multa, estas pli granda ol po 20 personoj en ĉiu kvadrata kilometro, dum en la tipaj dezertoj neniam atingas eĉ po 1. Tamen, la pluva malabundo en Zaragozo ekzemple, estas laŭ statistiko pli grava ol en Saharo, Arizono, Kalaharo kaj Atakamo mem, kaj la tuta Ebra regiono estas ĉirkaŭata de altaj montaroj, kiuj ĝuste estas la kialo de tiu eksterordinara pluva malofteco, pro tiu menciita sekigo kiun ili kaŭzas al la nuboj enirantaj la regionon, kiujn la montaroj kvazaŭ premas por verŝigi al ili ilian akvon, kiel se la nuboj estus veraj spongoj. Tiuj montaroj estas jenaj: Pirinea kaj Kantabrika norde, Iberia de NOk al SOk kaj Kataluna oriente.

Ŝajnas do strange, ke, se ĉi tiu lando estas iu el plej nepluvemaj regionoj el la mondo, sen tio ke ĝi havas grandan minriĉecon, ĝi ne estas preskaŭ tute senhoma. Tio okazas unue, tial ke la meza temperaturo ĉi tie ne estas tiel alta kiel en la cititaj dezertoj, kaj ebligas ke tera kaj kreskaj malsekecoj daŭru pli longe, kaj sekve, ke vegetaĵoj sukcesu prosperi, almenaŭ vintre kaj printempe, kaj due ke, kvankam sur ĝi malofte pluvas, tra ĝiaj riveroj kontraŭe, fluas abunda akvo, devenanta de pluvoj kaj ĉefe de neĝadoj falintaj sur ĝiaj ĉirkaŭantaj montaroj; kio kaŭzas ekzemple, ke Ebro estu la plej akvoporta rivero el Iberia duoninsulo, Tiuj geografiaj kondiĉoj permesas al la loĝantaro pli-malpli facile unue, trinki kaj poste, akvumi la kampojn; t. e.: krei verajn oazojn laŭlonge de siaj riveroj, apud kiuj ĝi ja grupiĝis de praavaj tempoj, dum la cetera lando, esceptinte la montarajn regionojn kie brutaroj bone prosperas, estas preskaŭ dezertoj, aŭ almenaŭ stepoj, kiel okazas al Monegroj, Violado, Kalanda teritorio k. c.

Estas fakte la Ebra ne montara regiono vastega stepo, kie nur greno prosperas iujn pli pluvemajn jarojn, sulkigata de akvoportaj riveroj kiel: Ebro, Aragono, Gállego, Segro, Jalono kaj


Martino, apud kiuj kuŝas pli-malpli abunde akvumitaj kampoj, nutrantaj preskaŭ la tutan loĝantaron de la lando; aŭ, per aliaj vortoj, granda steparo parte fariĝinta kaj parte fariĝonta fruktodona oazo, kiam la riveraj akvoj estos lerte profitataj, tial ke suno abundas kaj pro tio, la valoro de ĝiaj ĉiuspecaj rikoltoj estas granda.

Necese estas tamen, por atingi la kompletan eblan akvumadon de la lando, konstrui ankoraŭ multe da kanaloj kaj da artefaritaj montolagoj, kiuj ofte celas nutri la unuajn kaj ankaŭ, ĉiam, reguligi la akvokvanton, ĉar sen ĉi tiuj akvujoj, oni ne povas amasigi la troan akvon falantan dum vintro kaj printempo, kaj tiun devenantan de neĝa degelado en ĉi tiu lasta sezono, por profiti ĝin somere, kiam ĝi estas pli necesa kaj kiam tamen, ĝi malabundas aŭ eĉ tute mankas.

Aragono do estas regiono, en kiu ĉio dependas de la homa kolektiva aranĝado por akvumi la landon. Ĉu malloga dezerto, aŭ vastega ĉarma oazo. Ĉar, kiam dezerto estas akvumita fariĝas ja gaja paradizo, kie ĉielo estas nur malofte nuba kaj ĝia seka klimato, tre saniga por la homoj.

Tamen, tiuj necesaj konstruaĵoj por la ĵus dirita celo estas ege multekostaj, kaj sekve, fareblaj nur per streĉa kuniĝo de ĉiuj; kaj tio ne estas ĉiam facile atingebla, se vera, ĝisfunda amo al la regiono, ne nur de la terkulturistoj sed de ĉiuj ceteraj, ne ekzistas.

RAMÓN DE SALAS.



Feliĉe nia Societo, jam havas malgrandan sed propran bultenon kaj de ĝi mi volas alvoki ĉiujn gesamideanojn kaj nekonatajn geamikojn kiuj sentas en sia koro amon kaj pacon, du noblajn kaj grandajn idealojn.

Bedaŭrinde, multaj gesamideanoj venas en nian klubon por lerni *esperanto* sed multaj el ili ankoraŭ ne sentas nek komprenas perfekte nian belan idealon. Mi estas tute certa ke se ili konus agadon de esperanta lingvo, facile ĉiuj ili disvastigus ĝin inter aliaj amikoj kaj samtempe tiuj kiuj jam estas niaj samideanoj komprenintaj esperantan celon, neniam forgesus nian Societon.

Estas do tre necese ke ni kiuj vere sentas kaj amas tutkore *esperanton* ne laciĝu sciigante al niaj gesamideanoj en la klubo kaj for de «Fraterco» al niaj geamikoj el tutaj klasoj, bonecon kiun enhavas nia bela, facila kaj internacia lingvo. Kompreneble ni devas konvinki (laŭ niaj povoj) unue niajn samideanojn kaj poste ĉiujn niajn geamikojn.

Plie, karaj gesamideanoj, ni ĉiuj bezonas bone scii ke anoj de Fraterco estas devigataj *favori*



Ĉiam al amiko aŭ vizitanto de nia klubo. Anoj de «Frateco» neniam devas havi malamikojn, ĉar idealo de *esperanto* estas paco kaj pacon devas ankaŭ senti nia koro.

Dro. Zamenhof, memorinda homo en tutmondo, kreis sian lingvon, ne por siaj amikoj nek siaj sampatrujanoj sed por homaro. Ĉiuj homoj estis por li indaj de sia intereso kaj ankaŭ instruindaj per sia esperanta lingvo.

Ĉiuj rasoj estas same rigardataj per nia esperanta unuigo kaj kvankam ili apartenas al diversaj religioj. Sub nia verda standardo ĉiu homo havas amikan (loĝejon) lokon. Nia unuigo estas la plej vere internacia el tutaj ekzistantaj.

*Esperanto* estas ankaŭ la plej amanto de *mond-paco* kaj ĝia spirita movado en tutmondo estas praktiki amon en niaj internaciaj rilatoj. *Esperanto* nomigas dolĉe fratoj eĉ niajn malamikojn, ĉar *esperanto* devigas al ni forgesi internaciajn malamikecojn, kiuj ekzistas antaŭ longe inter la popoloj. *Esperanto* estas belsona kaj ĝia interkompreniĝo kun eksterlandanoj rezultas tute perfekta.

Tion ĉi facile oni povas konstati kiam vizitas FRATECON eksterlandaj samideanoj, ĉar kelkaj novaj fratecanoj ankoraŭ malmulte konas nian lingvon, tamen se ili interparolas kun tiaj vizitantoj, ĉiam ili interkompreniĝas reciproke.

Samideanoj, estas necese disvastigi kun intereso nian idealon inter niaj amikoj, sed pli speciale konvinki unue niajn samideanojn kiuj tute nekonas aŭ eble jam forgesis esperantan celon.

Vizitu ĉiuj nian Societon! En Frateco geknaboj renkontos noblan amikecon, ĉar nia klubo ĉiam preta, ricevos ĝoje novajn anojn.

Ĉiuj laborantaj klasoj havas reprezentantojn en Frateco, tamen ni ĉiuj kunvivis kvazaŭ propraj fratoj kaj en frateca klubo estas eble trovi klasikan demokraton kiu malfacile ekzistas en aliaj societoj.

Venu ĉiuj geamikoj; fratecanoj atendas vin.

MARÍA CASASNOVAS.  
Komitatano de Frateco.

## EN KIU JARCENTO NI VIVAS?

Mi aŭdadas kaj legadas, ĉiam kaj ĉie, pri la hispanaj idiomoj aŭ dialektoj. Tiu problemo estas nune unu el la plej interesigaj por la hispanoj.

Katalunoj, valencianoj, leonanoj, vaskoj, galicianoj, k. t. p. volas ke ilia idiomo estu oficiale instruata. Oni diris al mi ke eĉ andaluzianoj intencas starigi liceon pri lingvo «caló».

Vere la romanoj lasis al ni interesan ludilon.

Kion ni farus nune se ni ne havus tiun problemon?

Tial ke ni ne havas aliajn gravajn en nia politika vivo, tiu de la idiomo pasigas nin la tempon distrege.

Pro tio mi estas tre kontenta kaj tre dankema al la romanoj. Tuj kiam mi vidos belan romanon faros al ŝi, se ŝi volas, elmontron de mia dankemo.

Estas sendube tre interesa ke nun estu kontraŭ aliaj, ekzemple, pri tio ke «diputación» estu «diputación», «mujer» estu «muller», ĉar tiu vorto portas «s» tie ĉi kaj tie ne...

Tre interesa, ĉar tial ni malsimiligos nin.

Mi proponos al la deputito—kiu sendube triumfis pro mia voĉdono—ke li proponu al la Kongreso ke la regionaj vestoj estu devigaj. Estas malsaĝajo ke ni vestu nin same kiel la angloj, francoj, k. t. p. Ke li proponu ankaŭ ke la aŭtomobiloj, anstataŭ la universala bleko «pooh... pooh», avizu per gramofona krio; ekzemple: ¡¡Ninchi, oscila que la vas a diñar!! aŭ ¡Apa noi! kaj tiel, aŭdinte la aŭtomobilon, ni, preskaŭ plezurmortantaj, ekkrius: Sampatruja aŭtomobilo! kaj eĉ, kun granda plezuro, ni finus nian vivon sub ĝiaj ruloj... dirante ameme: Ah, kiel bone ĝi mortigas!

Sed, tiu aŭtomobilo devas esti farita en nia regiono. Mi opinias ke ni ne devas uzi maŝinojn faritajn de fremduloj, nek la elektran lumon nek la radion nek tute kio ne estis farita ĉe ni.

Nur la aĵoj faritaj de ni. Vivu nia patrujo!

Iu, kiu, laŭ mia penso, estas idiota, diris al mi ke kastilana lingvo ne havas kulpon pro tio ke ĝi estis dekretita de la saĝa reĝo oficiala hispana lingvo, ke ĝi estu parolata de cent milionoj da homoj, kaj li aldiris-azeno!-ke, ĉe ĉiuj problemoj de la moderna vivo oni akceptas la decidon de la plimulto; kaj same kiel oni faris kun la antikvaj peziloj, ni devas forigi la regionajn idiomojn, volonte, kaj alpreni kore la nacian. Ke tio estus pruvo de progresemo.

Kaj ankoraŭ pli parolis-porko!-Li diris: «Mi plezurege perdus mian kastilan lingvon se iun tagon ni ĉiuj, leviĝus parolante unikan lingvon kvankam ĝi estus la kataluna aŭ la vaska aŭ la ĥina; estas same; mi nur deziras ke la tuta homaro sin facile komprenu. Mi estas homo de la XX<sup>a</sup> progressa jarcento.»

Bone! Li estas nune vivanta, ĉar mia bopatrino vokis min kaj mi tuj deiris. Sed ne, pro mia malbona karaktero, mi eĉ mordas al li okulon! Neniam mi vidis tiel grandan kamelon! Ĉu ni vivas en la XX<sup>a</sup> jarcento?

Mi estas tre ĝoja ĉar nune mia antikva aragona idiomo, tiel mallogika kiel la aliaj, revivos. Mi petegos al Dio ke se Li donas al mi novan filon, ĝi venu al la hejmo de liaj gepatroj kun gran-



dega kapo por enmeti en ĝi multajn idiomojn.  
Mi estas tre kontenta!

Kaj kiam ni ĉiuj, veraj regionanoj, atingos tiun historian celon pri idiomato, mi iros tra la tuta Hispanujo predikante ke ni devas preni la historiajn rememorojn de iom pli longe, ekzemple el la romana divido, kun latina lingvo, aŭ el la fenicioj.

Kaj estas tute certe ke mi havos multajn ulojn kiuj sekvos mian doktrinon kaj multe parolos pri mi. Mi estos tre grava persono.

JOSÉ ORÓS.

## ¡HOLA FRATECO!

Vi, kara leganto mia, kiu bonvolega kaj pardo-nemega devas esti tial ke ankoraŭ min legadas, komprenas bone, sciante mian amon al «Frateco», kiom mi estas revinte pri ĝi dum dudek jaroj. Mi revis «Fratecon» riĉa, amplena, aganta, de nenin nekonata, de ĉiuj respektata, brilanta en la regiona, nacia kaj internacia rondoj.

Sed... mi konfesas ke, vidante la nunan realcon, mi trovas miajn revojn tro humilaj, tro modestaj. «Frateco» estas nun ĉio tio, sed pligrandigita. «Frateco» vivadas tute konfide, nenion ŝuldas, enhavas en sia kaso milojn da pesetoj, ne povas en sia hejmo enteni siajn anojn, laboras, organizas festojn kaj ekskursojn, estas konata kaj respektata de ĉiuj, brilas kiel plej luma stelo en la esperantista ĉielo kaj... eĉ eldonas gazeton!

Dum multaj jaroj, en miaj sociaj, profesiaj, kaj amikaj rondoj, kiam mi alvenis, la ĉeestantoj salutis min dirante: «*Hola Frateco!*» (legu *Frateko*), karese, jes, sed... iomete ŝercante, preskaŭ iomete mokante.

La tempo ŝanĝis.

Nun la salutaj vortoj «*Hola Frateco*» estas la samaj, karesaj amikaj, eble ankoraŭ ŝercantaj, sed sen la malpli granda moka aspekto.

La miraklo estas farita de la nunaj gefratecantoj: al tiuj ĉi apartenas la gloro de la triumfo, preskaŭ tiel granda kiel tiu de la neforgeseblaj fondintoj de «Frateco».

Sur la tomboj de la fondintoj kaj sur la frunktoj de la venkintoj, mi sentas nevideblajn laŭrajn kronojn, metitaj de la amo kaj la danko de la homaro.

Kaj mi, nek fondinto, nek venkinto, nur aminto, amanto kaj amonto de «Frateco», vidante ĝian nunan gravecon, min sentis fiera, kiam oni min salutas «*Hola Frateco!*»

MANUEL MAYNAR BARNOLAS.

## ANONCO

Je la dekkvina tago de la proksima Septembro komencos la nova kurso pri Esperanto, speciala por fraulinoj.

## KIAL MI ESTAS ESPERANTISTO?

Kelkfoje mi estis leginta kaj aŭdinta pri Esperanto; kelkfoje ankaŭ, mi intencis koni detalojn pri la graveco de tia internacia lingvo, sed ankoraŭ mi restus nenion sciante pri ĝi, se ian tagon, unu el miaj amikoj, esperantisto de la antaŭa jaro, ne estus konvinkinta min por viziti sian klubon, ĉeesti la klarigadon de sia instruisto, konstati la entuziasmon de la kunsocietanoj kaj koni la disvastigadon de la ideo tra la tuta mondo. Kiel konsekvenco, mi, en tiu tago decidis lerni Esperanton.

Tio ĉi okazis je Aprilo de la 1928<sup>a</sup> jaro. Mi estis lernanto de S-ro Artigas, unu el la pioniroj de la esperanta movado en Zaragoza. Profesoro de FRATECO dum pli ol dudek jaroj, al li ŝuldas la Societo sian longdaŭran vivon kaj al li ŝuldas ĉiuj ni, la malnovaj kaj novaj esperantistoj, daŭrigi la prenitajn vojon ne timante laciĝon nek enuon.

Dank' al lia lerta, sprita kaj konvinkema instruado, mi, post du monatoj, jam skribis leterojn al fremdaj gekorespondantoj kun kiuj interŝanĝis kartojn, fotojn k. c.

Tiamaniere mi komencis la esperantan vivon kaj, poste, iom post iom, praktikante la paroladon kun aliaj samideanoj, mi sukcesis kompreni kaj esti komprenata, parolante nur la internacian lingvon *Esperanto*.

I. FLORÍA.

## SCIIGOJ

Redaktoroj de la Bulteno estas: f-inoj Casasnovas, Salvo; s-oj: Maynar, Achón, Artigas, Martínez, Orós, Salas, Bruquetas, Gastón, Etayo, Larruga, Turrión, Floría, kaj la esperantistoj kiuj deziros helpi, sendante siajn verkajojn; ĉio povos esti publikigata: artikoloj, rakonto, k. c.

\*\*\*

S-ro Piñó Alegret, eminenta samideano, el la valencia regiono, honorigas nin per afablega gratulo pro la apero de NIA Vivo, kiun li bonvole kvalifikas kiel «*admirinda*».

Ni dankas lin tutkore.

\*\*\*

Ni ricevis gratulajn leterojn pro apero de NIA Vivo, de: S-roj Senra el S. Sebastián, antikva fratecano; Jiménez Mora el Oviedo; Uceda el Jaén; Alberó el Cocentaina; Bescós el Huesca, kaj de López Ros el Jaén; tiu ĉi s-ro sendis al ni peseton kiel helpo, kaj artikolon verkita de li; tiun artikolon oni publikigos en la 3<sup>a</sup> numero kaj ni kore dankas pro tia helpo.

Ni dankas al ĉiuj pro la gratuloj kaj pro deziro de longa vivado de NIA Vivo.